2.a JARO N.o 9 DUONMONATA ESPERANTO - GAZETO 1 MARTO 1937

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## La invado de Hispanio estas vangofrapo al la tutmonda demokratio!

**La faŝismo de Italio k Germanio, sub komuna signo de malamo al homaj rajtoj, invadas nian landon k rabas gravan urbon al popolo, kiu ne pro tio ĉesos bataladi por defendo de sia ekzisto, por detruo de perfido, por honoro de modesta klaso k por honto de rigardantaro, kiu serĉas emocion en nia agonio**

## MALAGO

Tuj post barbara okupo de la ĉarma urbo, perfida generalo Franko paroladis per faŝista radiostacio; sen tremo en la voĉo, blasfeme li diris, ke la bela Malago post la «patriota» okupo denove estas hispana. Preskaŭ samtempe, grava internacia agentejo ricevis depeŝon, el Gibraltaro, kiu lakone informas: «La armeo, kiu eniris en Malago, ĉefe konsistas el dek du mil italoj».

Dek du mil infanteriaj italaj soldatoj, pluraj miloj da germanoj, barbaraj legianoj k maŭroj sovaĝaj. Du germanaj kirasŝipoj, en la ribela eskadro, bombardis la urbon k la vojojn apud la marbordo. Fremdaj aviadiloj murde flugis tra blua ĉielo. Du italaj krozŝipoj, kun apogo de germanaj submarenoj, manovradis ruze malhelpante la movojn de la popola legitima eskadro. Tia nur estas la armeo «naciista» kiu kaptis invade la urbon Malago!

Franko sendis publike telegramon al Mussolini, gratulante lin pro efika helpo. En gravaj urboj de faŝista teritorio okazis festoj k zumadis preĝoj, pro ĝojo k danko. Oni ĝojas k oni dankas ĉar hispana urbo, kun hispanaj defendantoj, estas venkita, profanita k detruita de fremda soldataĉaro!...

La kruela okupado de Malago havis postajn epizodojn por nigra paĝo de la hispana faŝismo, lola burĝono nuntempa de la Inkvizicio. Ne estas necese terurigi la legantojn, en patosa rakonto, pri la abomena sangavida buĉado, kiu rapide flagris apoteoze kontraŭ la civila senkulpa loĝantaro. En moderna epoko, kun ŝajno mensoga de alta civilizo, reaperas krude, antaŭ frapinda vizaĝo el ŝtono de demokrataj gvidantoj, forgesitaj scenoj k frenezigaj bildoj de tiuj militaĉoj, laŭ orienta stilo, dum antikvaj tempoj, kiam ventroj gravedaj k gorĝoj infanaj spasme k true malfermiĝis per tranĉo de ponardo, kiel fatala sorto de venkitoj sen rajto.

Oni laŭtigis oficialan deklaron pri mortkondamno k tuja ekzekuto de 150 civiluloj, sub akuzo de komunista estreco. Tio, kompreneble, estas nur preteksto ĉar la konkerintoj, por inspiri timegon, nepre bezonas verŝi sangon abunde; ili, kiel deserto en funebra festeno, mortpafas dekojn k centojn da mizeraj proletoj. Se tiaj krimoj «laŭleĝaj» daŭras, oni povas supozi kiom da «eksterleĝaj» ekzekutoj okazas paralele. Elokventa indico estas ja la kolektiva protesto de alilandaj ĵurnalistoj loĝantaj en tiu infero. Mussolini, post konkero k kontrolo de tiu andaluzia marbordo, kun grava haveno je strategia valoro, povas revaĉi, kvankam provizore, pri la eblo starigi tie la bazon de sia proksima atako kontraŭ la paco de alia popolo. Fatala sorto trudis al Hispanio la rolon oferi la vivon de ĝia junularo, la arton de ĝiaj monumentoj k la prosperon de ĝiaj kampoj por elmontri sufere la metodojn k taktikojn de abomena doktrino je la servo de kruela ekspluatismo.

La faŝismo ne havas patrion; tiu vorto sentimentala estas nur, en ĝia buŝego, allogilo por facile knedi la homojn, transformante ilin en organikaj obeemaj maŝinoj, devigataj eterne liveri sian ŝviton por grasigi la malmolan karnon de sennaciaj kapitalistoj.

Malago falis! jen epizodo tro dolora por ne densigi ankoraŭ pli forte la vicojn, kun la firma celo gajni la perditan juvelon k rehispanigi la lokon kie oni ĝemas nun sub teroro de marĉandistoj k fiaj generaloj, kiuj murdas personojn k disvendas nacion por atingi, kiel almozon, la ruinojn de mirinda regiono de Hispanio k la kadavrojn de la plej noblaj hispanoj. Sed ni ĵuras, kun solena konscio, ke la sufero k ofero de Malago ne estos vana!

## Sango en nia stelo

Trançanta, kiel klingo de ponardo, venas kruda sciigo: La faŝistoj en Kordobo mortigis ĉiujn esperantistojn!

La esperantismo, verda banto ameme unuiganta kontinentojn k landojn, en faŝistaj ŝtatoj estas suspektinda «manio» aŭ kontraŭnacia judaĵo; sekve, tie, kiel «prudenta» decido, oni oficiale malhelpis, police kontrolis aŭ simple malpermesis ĝian propagandon.

En Hispanio tio nur ne sufiĉas!

Por la ebriaj k analfabetaj ribelintaj generaloj, grupo de esperantistoj estas kvazaŭ ĉelo de komunistoj aŭ loĝio de framasonoj. «—Esperanto estas ĉefa delikto kontraŭ la unueca sento de nova Hispanio!» diris Franko ordonante tuj persekuton k punon je morto al ĉiu esperantisto. Efektiviĝis la barbara ukazo; kugloj trapikis cerbojn k korojn de homoj, pro la sola kulpo lerni fervore tiujn saĝajn dek ses regulojn de nia kara gramatiko. Gutoj el samideana sango makulis, en jakoj, butonojn kun la verda stelo k tiam akiris tragike realon, unuan fojon en la mondo, la simbola emblemo de la proletaj esperantistoj...

Esperanto havis pionirojn, naskis apostolojn k hodiaŭ, post kvindek jaroj de paca ekzistado, ĝi jam povas prezenti eĉ martirojn al la filistra mondo, kiu rigardadas nin ankoraŭ kun indiferento k mokoj.

La korpoj trapafitaj de niaj amikoj el Kordobo estos daŭra akuzo patosa por tiuj verdstelanoj, kiuj eksterlande, en komforta medio, rigardas supraĵe la hispanan epopeon, kvazaŭ ĝi estus nur privata kverelo inter politikaj partioj en pitoreska lando de toreadoroj, kolonia konflikto inter sovaĝaj indiĝenoj aŭ... puninda rezisto de «ruĝuloj» al ordo k obeo tradicia.

Brava junularo el tuta popolo, en divizio de armeo, batalas en fronto, luktas en parapetoj, mortas en tranĉeoj defendante liberon k progreson; ŝirmante tiujn helajn kondiĉojn, ili ĉiuj, kun flamo de espero en la brusto, eĉ sciante multaj nek vorton pri Esperanto, defendas pli efike nian lingvon ol tiuj samlingvanoj, kiuj, antaŭ atako de lupo kontraŭ ŝafo, flegme rezonas, sen volo nek deziro elekti flankon de kruda dilemo.

En la nigra Hispanío, Esperanto ne jam estas ludo, ĝi estas risko je morto! estus ja interese scii, kiu en decida horo neos sian apartenon al verda movado, eĉ neŭtrala!, ĵetante fore, kun maldanko k paniko, la ĝentilan verdaĵon de nia kvinpinta blazono.

Neniam ni portis, kun tioma fiero, la verdan stelon ol nun, kiam nia emblemo estas per si mem, plaĉe aŭ malplaĉe, sed fakte, konkreta signo antifaŝista!

# Panoramo el ribela ariergardo

Kiel ekzemplo pri kia estas la vivo ĉe la landparto regata de la faŝistoj, ni prezentas al nia legantaro travivaĵojn de tri kamplaboristoj, falintaj en la manojn de la ribeluloj en Teruel. Ili mem rakontis ĉion al unu el niaj redaktoroj.

Tiuj tri kamparanoj troviĝis tie ĉe eksplodo de la ribelo. El Valencio ili estis veturintaj sin proponi, dungite, por falĉi. La ribelintoj facile sukcesis en Teruel, same kiel en aliaj malgrandaj urboj, kie la laborista klaso estis malforta k ne ekzistis vigla proletorganizado. La falĉistoj, pri kiuj temas ĉi tiu raporto, estis devigataj por savi la vivon en la unuaj momentoj, lerte detrui siajn sindikatajn membrokartojn. Tute certe, se oni malkovrus sur ili tiun dokumenton, ili estus pereintaj senrimede. Post tiu singarda ago, ili pretigis sin konduti kiel faŝistemuloj, ĉar en fremda nekonata loko, ili sin trovis absolute senpovaj kontraŭ siaj mastroj.

Malgraŭ tio, ke ili ŝajnigis simpatii al la faŝistoj, oni traktis ilin kiel sklavojn. Ilia rekta mastro estis mezaĝa pastro, kiu bone ekipite per pistolo k vipo, dejoradis apud ili k aliaj malfeliĉaj samsortanoj sub la faŝista jugo. Ĉar tiuj laboristoj estis nejunaj k oni suspektis pri ilia sincero, oni ne sendis ilin batali, sed labori en konstruo de fortikaĵoj. Ĉiutage frumatene, ili estis kondukataj al proksimaj altaĵoj, ĉirkaŭantaj la urbon, kie ili restis ĝis vesperiĝo. Tiam sub la ĉiama senkompata viglo de elektitaj «falangistoj» gvidataj de la pastro, ili estis rekondukataj, per ŝarĝaŭtomobilo, al sia mizera loĝejo, kvazaŭ karcero.

Tiel forpasis monatoj. Dum tiu tempo ili vidis teruraĵojn, inter alie la konstantan ekzekutadon al maldekstruloj k ties familianoj, eĉ ne kontraŭstarintaj la ribelon. Tuj post kiam la faŝistoj starigis sian estrecon en la urbo, ili senprokraste mortigis longan serion da personoj, kies nomoj estis jam de antaŭe enskribitaj en listo. La murdado estis kruela, ĝi atingis eĉ infanojn k ne respektis sekson. Sed la ekzekutoj ankoraŭ daŭras inter la loĝantaro eĉ post ĉies submetiĝo al la faŝista aŭtoritato. Multaj kunuloj de la tri laboristoj malaperis, viktimoj de suspekto. Kompreneble, ne mankas pretekstoj por pravigi la mortigojn. Sufiĉas, ekzemple, ke oni observu surstrate du personojn, kiuj, renkontinte unu la alian, interbabiladas. Subite, la lakeoj de la faŝismo izoligas ĉiun parolanton. Aparte oni demandas al ĉiu, pri kio ili konversaciis k se ambaŭ respondoj ne interakordiĝas, ambaŭ estas enkarcerigataj k plej ofte pafmortigataj.

La «falangistoj» amuziĝas ordonante al siaj sklavoj krii «Vivu la Faŝismo! Supren Hispanio!» k trude kantigas al ili faŝistajn himnojn. La kompatindaj viktimoj pacience esperis havi okazon, pri kiu ili sopiris, forkuri el siaj gvardistoj. Sed la ŝanco malfruis... Ili ja ne povis komuniki al siaj kamaradoj tian planon, pro timo esti denuncataj. Nur inter si ili kaŝe priparolis kun zorgo por eviti suspektemon.

Dum veturo al la laborloko, ili aŭdis konversacion de la gvardistoj pri ĵusa forkuro de mortkomdanito, kiu sukcesis liberiĝi lastmomente dum la nokto. La pastro diris al siaj amikoj: «—Vi kulpas pri tio. Se vi estus mortigintaj lin hieraŭ vespere mem, li ne estus forkurinta.» En la komentarioj pri la afero, la pastro aldonis: «—Vi tro fidas al la vortoj de tiuj malbenindaj laboristoj k eble tiuj, kiujn ni kunportas nun, estas «ruĝuloj», celantaj ankaŭ forlasi nin.»

Hazarde tiun vesperon, pro nekonataj kaŭzoj, la ŝarĝaŭtomobilo ne alvenis repreni ilin. Ili atendadis longe, kun alia laboristo el Andaluzio, kaptita de la faŝistoj en la samaj kondiĉoj. Tiu andaluziano tre ofte fanfaronis kiel konvinkiĝinta faŝisto. Sed noktiĝis jam k supozante, ke la aŭtomobilo difektiĝis, oni decidis reiri la urbon piede. La tri amikoj mallaŭte interkonsentis, ke estas favora okazo por efektivigi sian planon forkuri al la linioj de la registaranoj... sed la apudo de tiu andaluziano komplikis la feron. Li marŝis antaŭe. La aliaj intence paŝis malrapide por pliigi la distancon ĝis li. La andaluziano, de tempo al tempo, instigis ilin marŝi pli rapide por ne alveni la loĝejon tro malfrue, sed ili respondis, ke li iru senĝene ĉar ili ne emas kuri sed preferas promeni.

Vane ili klopodis kreskigi la spacon de ili al andaluziano. Kvazaŭ en ĉi lasta estus vekiĝinta suspekto, li ne plu rapidis k preskaŭ halte, kantadis faŝistan himnon. Tiam ili komprenis, ke urĝas agi decide k sin turnante al li minace, ili prezentis krude la aferon, dirante: «—Ni volas transiri al la tranĉeoj de la popolanoj. Diru tuj! Ĉu vi estas kun ni aŭ kun la faŝistoj?»

La demandito, kun ĝojoplena mieno respondis: «—Ho! mi estas feliĉa, ke vi konfesis tion al mi... Mi nepre iros kun vi. Mi estas via frato, mia obsedo estas kuri al la Popola Armeo!»

Post eksplodo de tiuj sinceraj esprimoj, ĉiuj brakpremis sin reciproke k tre kontente ekmarŝis singardeme en direkto al la pozicioj de la registaranoj. La tutan nokton ili paŝadis ŝancele kun timo fali en la faŝistajn tranĉeojn.

La morgaŭon, ili dumtage restis kaŝite, k nokte vagadis ĝis laciĝo. Je la sekvanta tagiĝo, ili estis terure lacaj k malsatis. Subite, ili ekvidis soldatojn sur monteto. Ili kun ektremo dubis... Ĉu ili estos faŝistoj? Ili ja timis esti perditaj k retrafintaj la malamikaron. Sed estis neeble daŭre sin kaŝi denove, ĉar la soldatoj estis vidantaj ilin. Ili do decidis sin liveri al kiu ajn estu. Kun angoro ili alproksimiĝis k baldaŭ ili ekĝojis, konstatante ke ili falas en la vicojn de la «lojaluloj».

Niaj legantoj imagu la ceteron, eĉ la postan gajan surprizon de la edzinoj k de la geinfanoj de la liberiĝintoj, priploritaj jam delonge, kiel viktimoj de la faŝismo.

Teroro, krimo, malsato, suspektemo, timo, larmoj k doloro. Tia estas la panoramo de la faŝista ariergardo. Kiom da kazoj similaj de ŝajna submetiĝo de antifaŝistoj, ne povantaj eĉ paroli unu vorton, pro dubo rilate al siaj kunuloj!...

**Ju pli granda suferado des pli forta unueco en la popola familio**

# RAPORTO PRI FAŜISMAJ KRIMOJ EN ARAGONO

Estas publikigita raporto pri aragonaj okazintaĵoj ekde de la 18. Julio ĝis unuaj tagoj de Januaro.

Kiam la registaro sendis generalon Núñez del Prado al Zaragozo por alparoli la ribelintojn li estis kaptita k batita de kelkaj faŝistaj oficiroj.

Dume, la laboristoj, surstrate, petis armilojn k ĉirkaŭis la kazernojn kie kunsidis militistoj k faŝistoj atendante taŭgan momenton por eliri.

La saman tagon oni sciigis ke la legitimaj aŭtoritatuloj jam kuŝis en karcero. Ekde la 3.ª matene komencis rapide la arestadoj; je la 6.ª horo oni deklaris militstaton k generalo Cabanellas paroladis asertante pri sia respublika sinteno. La laboristoj anoncis ĝeneralan strikon k karceroj pleniĝis amase.

La 21. ekaperis, ĉirkaŭ la tombejo, kadavroj de laboristoj apartenantaj al sindikataj k partiaj organizoj. La unuaj reliefaj arestitoj estis la eksdirektoro de Polico deputito Juan Casanellas, artileria komandanto Vicente Sist, kiu organizis la urbajn socialistajn milicojn, la direktoro de gazeto «Diario de Aragon» k registara delegito ĉe Hidrografia Konfederacio de rivero Ebro, Venancio Sarriá.

Ĉiumatene aperis kadavroj en Imperia Kanalo k en parko k monteto apud la urbo. Je la 9.ª vespere, ĉiutage, eniris faŝistoj en la karceron kun listo de arestitoj, kiujn ili prenis k alportis en kazernon; je la tagiĝo ili estis fusilmortigitaj.

La eksprovincestro de Asturio alvenis en la policejon, kie kelkaj gvardistoj insultis k vangofrapis lin. Ankaŭ la oficiroj agis same batante lin k apogante pistolon sur lia frunto devigis lin krii centfoje: «Vivu la faŝismo!» Gvardisto batis lin tiom terure ke blindigis lin unuokule. Poste li estis kondukata antaŭ generalo Cabanellas, kiu esprimis sian decidon fusilmortigi lin, sed tio ne okazis ĉar oficiro klopodis savi k enkarcerigi lin denove.

En faŝista informoficejo funkciis ia tribunalo al kiu apartenis pastro por faciligi «animsavon» al viktimoj, post turmentado. Per glasoj da ricino k specialaj turmentoj, kiuj nur finiĝas kiam sango elŝprucas, la faŝistoj klopodis atingi danĝerajn deklarojn.

Pluraj urbaj oficistoj estis eksigataj k fusilmortigataj la sekvantan tagon. Same okazis al multaj fervojistoj k tramistoj. La urbaj konsilantoj apartenantaj al popolfrontaj partioj pereis; samkiel la prezidanto de Provinca Deputitaro kiu estis eligita el sia hejmo en vilaĝo k kondukita, duone vestita, al Zaragozo. Iu advokato de Egea de los Caballeros estis eltrenata tra la stratoj k poste oni fortranĉis lian kapon; persiste k plurtage faŝistoj serĉis, ĝis trovo, faman medicinan profesoron, kiun ili mortigis kun lia familio.

Pro faŝistaj kugloj falis 80 geinstruistoj aliĝintaj al FETE (Hispana Federacio de Instruaj Laboristoj), ĝis lastaj tagoj de Decembro la nombro da ekzekutitoj estis pli ol 6.000; la faŝistoj, kiuj deĵoris ĉe informoficejo forprenis monujojn k ĉion alian, kion arestitoj kunportis.

En vilaĝoj la teroro gravis same, kalkulante la fusilmortigoj je 10.000. En subfaŝisma aragona zono civiluloj estas amase ekzekutitaj sen ia ajn motivo, ili eĉ ne kontraŭstaris la ribelon. En vilaĝo Zuera la mortigitoj estas pli ol ses centoj.

## EKZEMPLO IMITINDA

estas via silenta k fervora solidareco por nia entrepreno, karaj amikoj de la tuta mondo.

POPOLA FRONTO estas frukto de la esperantismo, de tiu esperantismo kies membroj rigardas suferojn k aŭdas ĝemojn ĉar ili mem ankaŭ suferas k ĝemas...

Ankoraŭ pli, fratoj en la sama celo, memoru pri niaj adresoj!

| ĜENERALA INTERNACIA ADRESO | NEDERLANDA ADRESO |
|---|---|
| nur por mono | nur por mono de holandanoj |
| GUSTAVE FARENC | PETRO van der PLANK |
| 56, Rue du Parc | Van Speijkstraat, 48-I |
| Poŝĉekkonto 15944 Orleans | poŝĝiro 245542 |
| ORLEANS (Loiret) FRANCIO | AMSTERDAM W. Nederlando |

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

**POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)**




La bela dormantino sonĝas...

## MEKSIKIO
### FRATA LANDO

Laŭ informoj laste ricevitaj, ŝajnas ke Italio rompos siajn rilatojn kun Meksikio, pro tio ke la registaro de ĉi tiu lando helpas morale k materie la legitiman registaron de la hispana Respubliko.

La meksikia ministro por eksterlandaj aferoj, sinjoro Rajmundo Beteta, dum disaŭdigita parolado, diris ke «Meksikio kredas respekti siajn internaciajn kompromisojn ne agante per egoistaj interesoj nek pro amikeco aŭ malamikeco kun aliaj popoloj.» Post kelkaj konsideroj, per kiuj li pravigas la helpon al la legitima registaro en Hispanio konforme al la etiko de la internaciaj rilatoj, li aldonis: «—Meksikio sin metas apud tiuj registaroj, kiuj havas kian ajn demokratan reĝimon, pravigita per la volo de la popolamaso.»

Ĉi tiu sinteno de la meksikia registaro, fidela interpretanto de grandega plejmulto de nia frata lando, estas bona leciono por ĉiuj demokratioj—jam tro malmultaj—, unuj senkuraĝaj k aliaj malkuraĝaj. Se ĉiuj estus agintaj tiele ekde la unuaj momentoj, certe Eŭropo ne sidus nun sur vulkano.

Tiel dece plenumas Meksikio siajn kompromisojn, ke la itala ambasadoro, Marcheti, devis retiriĝi ĉar la rilatoj inter la meksikia registaro k Mussolini acidiĝis tre intense.

La Prezidanto sinjoro Kardenas ĵus deklaris al ŭsona ĵurnalisto, ke «Meksikio estas tute malkaŝe kontraŭ la faŝismo, kiu pretendas transformi Hispanion en itala k germana kolonio».

Ĉi tio estas malgranda komentario, kiun ni ŝuldis al la nobla sinteno de la simpatia registaro de Meksikio, kiu senbrue, modeste, simple, kuraĝe, ne timis kontraŭstari tiujn, kiuj plenumas neniun traktaton k piedpremas la rajtojn plej elementajn de l' homo.

Nian plej fervoran dankesprimon al la popolo de Meksikio, kiu kompromitas eĉ siajn rilatojn kun gravaj nacioj por helpi la legitiman registaron de Hispanio, kiu en sankta kunfandiĝo kun sia popolo luktas kontraŭ la faŝismo!

## POPOLA FRONTO ESPERANTISTA!

Tra la mondo iru nun jam tiu flama celo. La efektivigenda devizo, en ĉiuj landoj, pri frata unueco en popola fronto, por defendi ekziston, kulturon k dignon, devas ankaŭ arde stari en nia verda movado.

# MOZAIKO

• En Valencio alvenis abiseno Ghvet, filo de *Ras* Imru, kiu luktis por la sendependo de sia patrio. «Abisenio—li diris—ne akceptas la jugon de Mussolini; ni ne forgesas niajn rajtojn pri libero. Tial mi estas ĉi tie; sciiĝinte pri via lukto mi tuj konstatis, ke temas pri atako simila. Mi ne forgesas la italajn masakrojn, la italajn aviadilojn flugantajn super Abisenio, la murdojn al infanoj k virinoj... Mi decidis veni tien ĉi, ĉar mi avidas helpi kontraŭstaron al tiraneco ĝis nun neniam konata.

• Laŭ faŝista gazeto «Heraldo de Aragon» la urba konsilantaro de Zaragozo kunsidis la 27. Januaro. Dum la kunveno, faŝista konsilanto amplekse laŭdis la ĝentilan partoprenon de la germanoj en la milito k proponis, ke la urbo faru solenan donacon de tereno por ebligi la konstruadon de germana tombejo, apud la ĝenerala tombejo. La propono estis aprobata.

Tio pruvas nerekte la efikon de niaj atakoj k estas dezirinde ke tiaj ĝentilaj donacoj ofte ripetiĝu.

• Profesoro A. Einstein sin turnis, al nia ambasadoro en Washington, per jenaj frazoj: «Mia devo estas, en nunaj cirkonstancoj, diri al vi ke mi min sentas ligita al via heroa luktado. Sed samtempe mi hontas, ke demokrataj landoj ne povis trovi, en aktuala situacio, la necesan energion por plenumi la devojn de frateco. Pli fiera estos Hispanio se, malgraŭ tiu ne interveno k la alia interveno, sukcesas elteni sian liberon».

• Faŝista kulturo estas organizata laŭ tute novaj procedoj. Provincestro de San Sebastiano ĵus dekretis la maldungon al 180 oficialaj profesoroj k instruistoj de la tieaj Universitato k Liceo. Tiun sciigon ni prenas el rekta fonto, el faŝista jurnalo, kiu tamen ne klarigas la novan uzotan proceden por starigo de «faŝista civilizo».

• La 5. Januaro alvenis en haveno Orano la itala komercŝipo «Silvia». La havenaj laboristoj rifuzis labori en ŝarĝo de tiu ŝipo ĉar ĝi transportis militmaterialon al hispana Maroko. La ŝipo foriris ne preninte eĉ karbon.

Ni varme gratulas tiujn laboristojn k esperas ke en similaj cirkonstancoj ĉiuj laboristoj agos same.

• En havenoj Cardiff k Newcastle same okazis al ŝipoj «Sneland I», «Maria Toft» k «Savonia», kies ŝipanaroj forlasis la ŝipojn ĉar oni intencis sendi ilin al faŝistaj havenoj; ĝis nun oni ne trovis maristojn, pretaj pri vojaĝo al nigra Hispanio.

• Laŭ oficiala statistiko de nia Ministro de Maro k Aero dum monato Januaro, ni faligis 21. faŝistajn aviadilojn k ni perdis nur 5 aeroplanojn.

• Fidinda forkurinto el Zaragozo raportas pri alveno en tiu urbo de 24.000 germanoj, 12 italaj plus 24 germanaj aeroplanoj. Estas konstruita subtera aviadkampo, sub la komando de germanaj oficiroj.

La ne-interveno daŭre progresas!

• La malfeliĉa tago de la perdo de Malago, 7. Februaro, je la 10ª matene eliris, el milithaveno Cartagena, ses respublikaj militŝipoj, kiu serĉis la faŝistajn por albatali ilin. En plena maro ili trovis du krozŝipojn, kiuj manovris laŭ aspekto de atako, sed forkurante de la persekutado de niaj ŝipoj. Kiam alvenis taŭga momento, la du ŝipoj lumiĝis k signalis por montri, ke ili estas italaj. Tiamaniere ili sukcesis ruze k malnoble devojigi niajn maristojn.

• La tutmonde konata, kanajla financisto Juan March komencis ricevi de la ribeluloj la pagon de siaj pruntoj. La katolikaj generaloj donis al li grandan parton de la grava juvela trezoro de aragona preĝejo *del Pilar*.

Tiuj juveloj estas senditaj, iom post iom, al internacia merkato. Tamen la «ĝentila» bankiero rifuzis fari al Franko novajn pruntojn.

• La fremdlandaj ĵurnalistoj, kiuj sciiĝis pri la amasega murdado tuj komencita en Malago, sendis angorajn petojn al eŭropaj registaroj por ke ili devigu ĉesi tiom da krimoj. Telegramo subskribita de franca, usona k anglaj gazetistoj estas speciale sendata al Leon Blum tiucele.

Ni ne multe fidas al tiuj bonkoraj penoj, aparte dankindaj, ĉar ni jam bone konas demokratiajn k faŝistajn registarojn.

• Radiostacio Burgos oficiale anoncis, ke faŝistaj tribunaloj mortpunis en Malago 150 ruĝestrojn, k ke ili jam estas ekzekutitaj Tio estas nur oficiala informo; miloj k miloj mortis je bato de tranĉiloj k ponardoj por ŝpari kuglojn.

• La 13. k la 14 Februaro estis bombardataj la urboj Barcelono k Valencio, nokte je la 10ª per italaj militŝipoj, kiuj kanonpafis dum kelkaj minutoj k tuj forkuris «kuraĝe». Estute estis pli ol 90 viktimoj.

La obusoj permesis malkovri, ke la ŝipoj estas italaj ĉar hispanaj ŝipoj ne havas kanonojn kun samaj dimensioj k ĉiuj obusoj surportas enskribojn, kiuj tekstas: «L 3 GEN. 35-XIII». Tio montras italan markon k jaron 1935, kiu estas la XIIIª de la erao faŝista.

• Laŭ itala grava gazeto «Informatore Italiano» de Genovo, la leteroj, kiujn oni ricevas el insuloj Balearaj, estas enpoŝtitaj kun italaj poŝtmarkoj.

La fakto ke oni agnoskas kiel legitimajn, la italajn poŝtmarkojn, supozigas, ke tiuj insuloj estas plene sub la jugo de itala faŝismo.

• Tuj kiam la komitato pri neinterveno aprobis decidon pri apliko de malpermeso al sendo de «volontuloj», multobliĝis la alveno de italoj al nia lando. Laŭ anglaj gazetoj «Times» k «Manchester Guardian» la kvanto da italoj en Hispanio kiu estis antaŭ kelkaj tagoj de 10.000, dum lastaj tagoj atingis la ciferon de 50.000.

Ni ne rimarkigas aliajn informojn ĉar ni supozas, ke niaj legantoj tion ne bezonas. Estas facile dedukti la sekvojn de tiu decido.

• Laŭ fidindaj sciigoj de forkurintoj el norda faŝista zono, la hispanfranca landlimo en la faŝista zono jam estas plena de tranĉeoj k fortikaĵoj. Intense oni laboras sub la komando de germanaj teknikistoj. Francaj aŭtoritatoj estas bone informataj pri tiu afero. Okuloj taŭgas por rigardi!

• Kiam ni verkas ĉi tiujn notojn, jam estas decidata la starigo de malpermeso pri sendo de «volontuloj» k kontrolo de hispanaj landlimoj. Dum lastaj tagoj de libera orgio de neinterveno, Hitler k Mussolini amase sendis soldatojn armilojn k municion al «sia» lando. Certe ili kredas tiamaniere finvenki nian popolon. Ni firme esperas ke ili ne atingos sian celon, almenaŭ ni batalos ĝis venko aŭ ĝis morto. La hispana historio rakontas pri multaj k trafaj similaj ekzemploj.

**La verda stelo, emblemo de espero, neniel estu vanta ornamo de filistro!**

# KOMUNA SENTO

Ili venis ĉi tien el plej diversaj landoj: Italio, Germanio, Norvegio, Svedio, Nederlando, Bulgario, Jugoslavio, Argentinio, Urugvajo, Usono ktp. tial ili ne povas alparoli unu la alian, ĉar mankas inter ili komuna lingvo. Tamen, ili kantis kune la «Internacion» en ĉiuj lingvoj. Inter ili troviĝas maljunuloj k ankoraŭ ne plenkreskaj knaboj, masonistoj, kamparanoj k muzikistoj, ĉiuj grupiĝintaj por albatali komunan malamikon. Ili batalas kiel herooj. Neniam ili forkuras. La maljunaj kamparaninoj ĉirkaŭbrakis k kisadis ilin. La malfeliĉulinoj volis krii al ili: «Vi estas niaj filoj, niaj infanoj, niaj defendantoj!» Sed, nek la hungaroj, nek la francoj nek la ĉeĥoj komprenis la hispanajn vortojn... Subite ili ĉiuj alten levas la pugnon k ĉiuj interkompreniĝas, dum larmoj fluas el ĉies okuloj...

Iam iu verkos mirindan libron, kiu pritraktos la kuraĝon, la heroecon k la fratecon, kiuj kune formos la historion de la Internacia Brigado. Ni esperu, ke kiam tia verkisto komencos sian libron ja li bone komprenos la signifon de la unulingveco por ke lingva ĥaoso neniam plu okazu. Dum tempo en kiu interkompreniĝo estas pli necesega ol ĉiam ajn antaŭe, ni devas semi, por ke ni poste abunde rikoltu.

Jam multaj anoj de la Internacia Brigado eklernis Esperanton k post kiam la lingvobaro estos detruita, ili plene ĝuados la profiton scipovi lingvon, kiu lernita montras sian utilon.

PETRO van der PLANK

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia Esperantistaro | 37 | ptoj. |
| H. v. d. Velde. - Krimpen | 28 | ffr. |
| P. S.—Orihuela | 5 | ptoj. |
| C. H.—Żeist | 6'5 | guld. |
| W. W.—Buenos Aires | 1 | dol. |
| A. M.—Bugarra | 2'50 | ptoj. |
| V. M.— » | 2'50 | » |
| V. S. - Kladno | 10 | ĉkr. |
| J. P. - Den Helder | 164'50 | ffr. |
| J. M.—Issy | 10 | » |
| Lab. Esp Klubo.—Stockolm | 86 | » |
| D. M. Charleroi | 60 | » |
| S. U. - Lysekil | 26'32 | » |
| K. B.—Fougeres | 10 | » |
| G. G. - La Ferte Alais | 20 | » |
| T. L. - Copemih | 36'84 | » |
| A. W. G. Staplefort | 5 | ŝil. |
| «La Espero». - Quaregnon | 46'75 | ffr. |
| F. S.—York | 6'70 | » |
| A. D. Chust | 7'41 | » |
| E A. J.—Ovanaker | 10 | svd. kr. |
| G. J.—Jonkoping | 10 | » |
| K. V. Veyprnice | 12'97 | ffr. |
| A. M.—Larbro | 50 | » |
| B. J.—Stonava | 22'22 | » |
| C. P. Vaulx | 10 | » |
| A. P. - Parnu | 28'41 | » |
| J. S. - Dunfermline | 78 | » |
| H. J.—Molycin | 7'41 | » |
| L. J. J.—Eindhoven | 19'88 | » |
| F B.—Wastraan | 25 | » |
| J. S. M. - York | 2 6 | ŝil. |
| J. L. - Sornain | 20 | ffr. |
| O. H. Česka Skalice | 14'81 | » |
| D. H. - Machen | 26 | » |
| D. J.—Kaunas | 35 | » |
| M. W.—Angleur | 14'38 | » |
| H. M.—Hauville | 20 | » |
| J. Z. Bregenz | 25 | » |
| R. C. - Reims | 10 | » |
| F. E. T., anoj. Toulouse | 95 | » |
| F. M.—La Vesinet | 30 | » |
| S. Esp. Klubo. - Sindi | 46 | » |
| F. L. E. Bruselo | 20 | bfr. |
| E B—París | 20 | ffr. |
| D. H. Halluin | 30 | » |
| J. B. Litomysl | 7'41 | » |
| Esp R. Lab.—Chicago | 10 | dol. |
| J. K. Bethlehem | 1 | » |
| R. V. Trainon | 10 | » |
| «Nova Sento». Barcelono | 10 | ptoj. |
| M B.—London | 5 | funtoj. |
| V. J. L. - Wellington | 1 | » |
| J. Ŝ.—Campo Quijano | 5 | pesoj. |
| Kiruna Esperantistaro | 300 | svd kr. |

## INFORMEJO

K-do. Bordes, el Tabernes de Valldigna nun batalas en la fronto. Lia adreso estas: V. S. Bordes, 21-a. Brigada Mixta. 1-er. Batallón, 1-a. Compañía. Colegio Pablo Iglesias, VALDELATAS (Madrid).

K-do. Justo Están bonfartas k loĝas provizore en Barcelono. Li ne povas skribi nun al ĉiu konato de li. Li verkos artikolon por «Arbetar Esperantisten Svenska» Eventuale ni ankaŭ presigos artikoleton de li. Lia adreso estas: Comité de Defensa de Gracia. — Calle Juan Viñas, 12 14. - BARCELONA.

K-doj Lledó k Tuset estas en bona- sano. La adreso estas jena: Carretera de Cardona, 2.-MANRESA, Catalunya (España)

K-do. Martínez Ungría sciigas siajn korespondantojn, ke li pasigis kvin monatojn ĉe la fronto. Tial li ne skribis, sed baldaŭ li skribos. Lia nuna adreso estas: str. Ausias March, 36 - 38, 1.°, 2.ª — BARCELONA.

### ONI PETAS INFORMOJN PRI

K-do. Simon Weerdenburg. Brigado Thälmann. kies laste konata adreso estis: S. R. I., Plaza Altozano, 52. ALBACETE. Lia patrino demandas pri li.

K-do Francisco Valdés Fernández, CALLOSA DE SEGURA (Alicante) estas pridemandata de korespondinto nederlanda lia.

K-do. Manuel Moreno, str. Jorge Vinaixa. 32. — CATARROJA. Soveta kamarado deziras scii pri li. Bonvolu sendi informojn al ni.

## LASTHORA IMPRESO

La perdo de Malago havis la efikon kreskigi impeton al la popola armeo, kiu post konvena preparo sukcese kontraŭatakas en la sama andaluzia sektoro. Madrido forpelas la malamikojn, kelkajn kilometrojn ekter la ĉirkaŭaĵo. En Oviedo, ĉefurbo de Asturio, la bravaj socialistaj ministoj en frata mikso kun katolikaj baskaj naciistoj, jam eniris liberige en la unuajn stratojn. La 6. de ĉi tiu monato ekfuncios la internacia kontrolo, por serioza apliko de la akordo pri ne interveno.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 35, Valencia

## POPOLFRONTA LETERUJO

J. L.—Pouy.—Bonorde alvenis ambaŭfoje viaj respondkuponoj, entute 15.

P. J. L., Esp. Klubo A. de S.—Haarlem. —Neniam ni aperigis artikolon pri la organizo, kiun vi mencias. Devas esti alia bulteno, kiu raportis.

W. J. B. - Tooting, London.—Ni ĉiuj, kiuj eldonas ĉi tiun gazeton, ankaŭ estas pacamantoj, devigataj elbatali pro la atako de la fihispanaj generaloj. Pacifismo estas malforta ilo antaŭ la atakema faŝismo. Ni rekomendas al vi legadon de artikoleto «La devizo: FOR LA BATALILOJN estu por la estonto», kiu aperis en nia lasta numero.

G. S.—Schoorl. —Vi skribas, ke vi ne komprenas Anglion, pri nia batalo. Ni male, ekkomencas kompreni tre multe... La kapitalismo putrigas la demokration ĝis haladzo. Jen la afero! Ni sendis al vi la petitajn gazetojn.

L. T.—Ljubljana.—Laŭ via poŝtkarto ni deduktas, ke vi vin turnis al O. K. en Barcelono. Vi daŭre ricevos «P. F.».

P. G. - West-Hartlepool.—Nia bulteno ne havas fiksan abonprezon. Monhelpo estas libervola. Okaze de monsendo, uzu nian perantejon en Orleans (Francio) kies adreson vi vidos aliloke sur ĉiu numero.

C. M. J. - Amsterdam. - Ŝlosiloj kun vortaretoj estos ĝoje ricevataj de ni, en diversaj lingvoj, por disdoni al fremdaj vunditoj en hospitaloj k al la Internaciaj Brigadoj, kiel propagandiloj de Esperanto.

J. B. - Rotterdam.—Ni dankegas vin pro via letero, kiu entenas pravaĵojn. Tamen, ĉar ni nenion postulas de niaj legantoj, se vi legas «P. F.» kun estimo ni daŭrigos la alsendadon.

A. K. Voroneĵ. - Kordanke ni kvitancas vian estimatan leteron k faros la eblon komplezi vin. Ĉiuj esperantaĵoj estos bonvenaj k utilos ĉe la internaciaj kunbatalantoj. Ankaŭ valorus multe tiurilate, lernolibroj de Esperanto en ajna lingvo.

V. B. - Falun —Kiel kvitancite en nia 6-a. numero, ni konfirmas ricevon de la mono el K-doj. I. E., N. L. kaj el vi mem.

Ch. M. - St. Alban's, Herts.—Se tio ne ĝenas vin, ni preferus sciiĝi pri la nomo k adreso de via amiko k ni sendus rekte la gazeton al li.

G. F.—Bois-Colombes.—Ni dankas vian librosendon k klopodojn. Eventuale ni profitos vian sindonan proponon.

R. H. K.—Utrecht.—En nia 8-a. numero ni konstatigis la ricevon de via mono. Viaj raportoj tre interesas nin k ĝustas ĉiuaspekte. Bedaŭrinde la laboristaro nederlanda ŝajnas esti tro submetita je la influo de la eklezianoj. Pri la maŭroj, ni verkos ion k aperigos ĝin en «P. F.» ĉar la diroj de la reakcia gazetaro vialanda tiurilate estas mensogoj. Ni penos sciigi vin pri la personoj, kiujn vi pridemandas. Ni ricevas la gazeton, kiun vi mencias, k aprobas ĝian enhavon.

A. G. Z.—Eindhoven.—Ni notas la indikojn de via letero. Nia nuna eldonkvanto estas 5.000 ekzempleroj, kiuj elĉerpiĝas ĉiunumere. Rilate al la lando de vi menciita, ni posedas amason da leteroj, atestantaj, ke la movado tie estas sufiĉe vigla. Ni povas havigi al vi adreson.